
Lev pensas. Li parolas logike kaj rapide: "Se ni mallevos la ponton, la trajno estos sekura, sed la ŝipo frapos la ponton. Tio estas malbona kaj danĝera!"

Ankaŭ Marga pensas. Ŝi parolas pli logike kaj rapide: "Se ni levos la ponton, la ŝipo ne frapos la ponton, sed la trajno frapos la ponton kaj ĝi falos. La trajno falos kaj frapos la ŝipon! Tio estos pli malbona kaj danĝera!" *

"Jes," decidas la edzo: "ni mallevu la ponton."

Lev mallevas la ponton. Marga Pont gapas al la maro, la trajno, la ŝipo kaj la ponto. Kio okazos?! La trajno venas al la ponto kaj transiras ĝin. La trajno estas sekura! Sed nun la masto de la ŝipo tuj frapos la ponton. La malinteligenta Lo staras en la observejo, sed li rigardas en la alia direkto kaj li ne vidas la ponton!



## Ĉapitro ok: Katastrofo!

En la observejo Lo Zaklap rigardas kaj diras: "Ne estas danĝero... en la su..." **KRAK!!!!** La masto frapas la ponton kaj la ponto frapas la observiston. La observisto falas de la observejo!

"Helpu!" li krias, "Mi falas de la kuirejo!"

"De la observejo!" korektas la subŝipestro.

* Vidu, ke logika, rapida pensado ne ĉiam helpas!






"Jes, de la obser..." **ŜKLUP!** La idioto falas al la ferdeko, sed sur la ferdeko staras la cilindro. En la cilindro estas petrolo...kaj nun ankaŭ observisto. La observisto rigardas. Ĉio estas nigra. La observisto sidas kaj pensas. Li pensas malrapide:

"...sud...oriento...okcidento... **nordo!!** Jes, estis danĝero en la nordo!" *

Lo rigardas. Ĉio estas ankoraŭ nigra.

"Ne estas lumo," li diras: "Ĉu estas nokto?"

Li pensas, sed li ne pensas logike:

"Ha! Jen alumeto! Baldaŭ estos lumo!" **

## Ĉapitro naŭ: La eksplodo!

"Permesu al mi rimarki," diras la subŝipestro, dum li flugas tra la aero: "ke nia ŝipo eksplodas!"





* Vidu, ke tamen malrapida pensado ankaŭ ne multe helpas!

** Vidu, ke nelogika pensado helpas eĉ malpli!

## Ĉapitro dek: Post la eksplodo

De la alumeto venis lumo, sed ankaŭ venis fajro. La fajro tuŝas la petrolon kaj jen granda eksplodo!

La cilindro staras apud la avertaj raketoj. La eksplodo tuŝas la raketojn kaj ili rapide supren foriras. Estis tre laŭta bruo!





La raketoj flugas de la ŝipo kaj la haveno. Ili flugas super la urbo al la domoj apud la rivero.

Unu raketo flugas al la domo, kie dormas la profesoro. Kaj li ankoraŭ dormas! La raketo falas. Ĝi falas al la fenestro de la dormoĉambro. Ĝi frapas la



fenestron. La raketo eksplodas apud la kapo de la profesoro. Ankoraŭ du aliaj raketoj envenas kaj eksplodas apud li.

**ILI VEKAS LA PROFESORON!!!**



## Ĉapitro dek unu: La vendisto revenas

La vendisto revenas. La profesoro diras al li:

"Via vekhorloĝo estas mirinda! Ĝi vekis min! Ĝi estas tre laŭta. Mi aĉetos ĝin!"

Kaj li tuj aĉetas ĝin.

# Demandoj kaj ekzercoj

Ĉapitro unu: Vendisto ĉe la pordo

## Demandoj pri la rakonto:

1. Kiu paŝis al la pordo kaj frapis ĝin?
2. Kiu malfermis la pordon?
3. Ĉu la profesoro atendis la vendiston?
4. Kiel nomiĝas la vendisto? Kion li vendas?
5. Ĉu la profesoro reagis entuziasme aŭ malentuziasme?
6. Kiel ni scias, ke la vendisto estas persista?
7. Kiu kriis "Aŭŭŭŭ!" kaj kial li kriis tion? Kiom da fojoj li kriis?
8. Kial la profesoro ne uzas vekhorloĝon?
9. Kion faris la profesoro trifoje? Kion faris la vendisto trifoje?
10. La vendisto faris proponon. Kio estis la propono?
11. Ĉu la profesoro kredis, ke la propono estas interesa? Kial?
12. Ĉu la profesoro aĉetis la vekhorloĝon?
13. Kial la vendisto estas feliĉa? Kiam li revenos? Kial li revenos?

## Demandoj ne pri la rakonto:

*Fermi kaj malfermi:*

**1.** La viro malfermis la pordon. Ĉu vi ofte malfermas pordojn? Kie? Kial? Ĉu aliaj personoj ofte malfermas pordojn por vi? Ĉu vi ofte fermas pordojn? Kial? Ĉu vi iam brue fermis pordon? Kia pordo estas nefermebla?

**2.** Kial oni malfermas botelon? Ĉu vi ofte malfermas botelon? Kiajn? Kial oni fermas botelojn? Kiel oni malfermas botelon, kiu estas ŝtopita



per korko? Ĉu vi estas eksperto pri tio? Ĉu vi ĉiam sukcesas malfermi botelojn?

**3.** Kial oni malfermas librojn? Ĉu vi ofte malfermas librojn? Kiajn? Kial oni fermas librojn? Kiajn librojn vi malofte malfermas?

**4.** Kial oni malfermas ombrelon? Ĉu vi havas ombrelon? Kiukolora ĝi estas? Ĉu vi ofte malfermas ĝin? Ĉu vi ĉiam sukcesas malfermi ĝin?

**5.** Kial oni malfermas butikon? Kiu malfermas butikon? Kial? Je kioma horo oni malfermas la butikojn en via urbo? Ĉu multaj klientoj atendas apud la pordoj antaŭ ol oni malfermas la butikojn?

**6.** Ĉu vi ofte malfermas vian buŝon? Kial? Kiam? Kie?

*Vendi kaj aĉeti:*

**7.** Kion oni vendas en librobutiko?...en fiŝbutiko?...en florbutiko? Kie oni vendas pomojn? Kie oni vendas biletojn? Ĉu vi vendis ion en la lasta jaro? Kion? Kion vendas la vendistoj, kiuj venas al la pordo de via domo?

**8.** Kion vi aĉetis hieraŭ? Kion vi aĉetos morgaŭ? Kion vi aĉetas ĉiutage? Kion vi aĉetas ĉiusemajne? Kion vi aĉetas ĉiumonate? Ĉu vi baldaŭ aĉetos televidilon? Ĉu vi baldaŭ aĉetos aŭtomobilon? Ĉu vi ofte aĉetas librojn? Kiajn librojn? Kie estas la grandaj butikoj en via urbo? Kio estas la nomo de la plej granda butiko en via urbo?




*Doni:*

**9.** En kiu monato okazas via naskiĝtago? Ĉu viaj amikoj donas al vi bonajn donacojn? Ĉu vi donas bonajn donacojn al ili? Ĉu vi ofte donas donacojn? Ĉu vendistoj ofte donas donacojn? Kial vendisto donus donacon?

## Ekzerco pluraliga:

Metu la **grasliterajn** vortojn en la pluralon, aldonante la nombron inter la krampoj:

*Ekzemplo:* La vendisto havas **belan horloĝon.** (3)

*La vendisto havas tri belajn horloĝojn.*

1. **La vendisto** paŝas al la pordo. (4)
2. Nia domo havas **grandan ruĝan pordon** (5)
3. **La vendisto** estas **persista.** (3)
4. **"Mia vekhorloĝo** estas tre **laŭta!**" (6)
5. La vendisto faris **interesan proponon.** (8)
6. **Mia nova vekhorloĝo** ne vekas min. (7)
7. Mi ricevis **senutilan donacon** hieraŭ. (9)

Metu la **grasliteran** substantivon en la pluralon, aldonante la nombron inter la krampoj. Se necesas meti aliajn vortojn de la frazo en la pluralon por produkti ĝustan frazon, ankaŭ tion faru:

*Ekzemplo:* La **kato** estas blanka. (3)

*La tri katoj estas blankaj.*

1. La **piedo** de la vendisto doloras. (2)
2. La **profesoro** estas feliĉa. (5)
3. Li fermis la grandan **pordon** laŭte. (6)
4. La malgranda **donaco** estas via. (7)
5. Mi kaj mia **amiko** promenis al la urbo. (9)
6. Donu al mi la **vekhorloĝon** kaj revenu morgaŭ. (4)
7. La malgranda **domo** en tiu urbeto estas tre bela. (3)

## Kaj ankoraŭ io...!

**1.** Traduku la suprajn 14 frazojn en vian nacian lingvon.

**2.** Elektu kvin el la grasliteraj vortoj el la supraj 14 frazoj kaj uzu ilin en kvin novaj Esperantaj frazoj.



## ROL-LUDO: LA VEKILO (por du personoj)

Rol-ludo estas speco de teatraĵeto. Sed ne ekzistas skribita teksto. Ni donas al vi la scenejon kaj la situacion. Ni ankaŭ donas al la aktoroj instrukciojn pri siaj roloj. Ĉiu devas aktori en la sceno laŭ siaj instrukcioj sen scii antaŭe la instrukciojn de la aliaj personoj. Vi trovos en ĉi tiu libro ok rol-ludojn. Por komenci jen simpla ludo, kun nur du roluloj.

La sceno estas studenta apartamento. Unu rolulo estas juna studento kiu tie vivas, la alia estas vendisto, kiu portas vekilon, kiun li aŭ ŝi devas prepari antaŭ la ludo. La vendisto provos vendi la vekilon al la studento. Rolulo A, la studento, trovos sian rolon sur paĝo 52 kaj rolulo B, la vendisto, sur paĝo 102. Bone amuziĝu!

**Ĉapitro du: Mateno**

## Demandoj pri la rakonto:

1. Kie dormis la profesoro?
2. Kie staris la vekhorloĝo?
3. Kie dormis la koko? Kaj la hundo? Kaj la kato?
4. Kio vekis la kokon? Kaj la hundon? Kaj la katon?
5. Kiu besto vekiĝis unue? Kio vekis la profesoron?
6. Kial la hundo vekiĝis? Kion ĝi faris?
7. Kial la kato timis kaj falis de la branĉo?
8. Kial la koko timis kaj forflugis?
9. La koko flugis al granda domo. Kion ĝi vidis? Kial ĝi timis denove?
10. Kio estis la 'terura nigra besto' kun blanka fumo kaj fajra stomako?
11. Kial la sonorilo falis? Kion ĝi frapis?
12. Kial trajno forveturis de la stacidomo?
13. Kial la stacidomestro kriis al la trajno "Revenu! Revenu!"?
14. Kial li kuris al la telefono? Kial ĝi ne funkciis?
15. Ĉu stacidomestroj ofte krias al trajnoj? Ĉu vi parolas al trajnoj?